



Karaj geomikoj, jen tute koncize pri niaj temoj: la Verdaj Partioj kaj Esperanto, okazajhoj pri ekologio, ekonomio, Homaj kaj Bestaj Rajtoj - multe pli amplekse vi trovas tiujn informojn sur nia retejo: [www.verduloj.org/aveno.htm](http://www.verduloj.org/aveno.htm). La tuta mondo estis skuita pluroble: de tiu Tertremo la 11-a de Marto 2011, kiu kausis la Atom katastrofon de Fukushima - 25 jaroj post Chernobil – pri kiu estas pluraj detaloj kaj tagaj raportoj en Esperanto; de la Jasmenaj Revolucioj en Norda Afriko kaj la Arabiaj Landoj, kaj influis ankaŭ pliajn - dum en aliaj landoj kiel Irano, Rusio, Centra-Azio kaj P.R.Chinio protestoj ankoraŭ estas sufokataj; krome ankoraŭ de la postsekvoj de la krevita financ-veziko de 2008.

AVE kunagadas por la abolicio de: Atomenergio, Mortpuno, Torturo, Diktaturo, Korupteco, Fanatismo. Dankon, se vi sendis leteron kun informoj kaj same se vi ankaŭ sendis la AVE-Kotizon.

### Agendo por AVE 2011 kaj għeneralaj informoj:

2011-07-23/30 UK de UEA en **Kopenhago, AVE**-kunveno. Diskuto pri la amendo-propono de AVE enmeti "Dauripovecon" laŭ la Agendo 21 en la UEA-Statutojn: [verduloj.org/UEA.htm](http://verduloj.org/UEA.htm)  
Jen teksto de W. Guenther (EcoMed) kiu klarigas la amendon: [cultura21.net/category/topics/esperanto/](http://cultura21.net/category/topics/esperanto/)

2011-07-30/08-06, Sarajevo, **SAT-Kongreso**, AVE & ekologia frakcio eble renkontighos.

2011-09-8/11 **Europa Verda Somer-Universitato**, Frankfurt & Slubice/Odro (DE&PL).  
Jen la ĉefa temaro: Dekstrala populismo - defio por la demokratio / Nova verda konsento - regajneblaj energioj kreas laborlokojn / EU - de ekonomie instigita regado al politika integriĝo.  
AVE planis informstandon tie. Sed għis nun ni estis nur triope: [www.green-summer-university.eu](http://www.green-summer-university.eu)

2011-11-04/06 Europa Verda Konferenco, Parizo:  
Mi planas partopreni – ĉu ankaŭ AVE ? dependas (ni devus esti pli ol 3) <http://europeangreens.eu>

2011-09-11/18 Prago, [www.kava-pech.cz/ekotur](http://www.kava-pech.cz/ekotur)

2012-03-29/ 04-01 **Tutmonda Verda Kongreso**, Dakar, Senegal, kie aktivas verda partio: Fédération Démocratique des Ecologistes du Sénégal (FEDES)

**Aliaj** (agado-tendaroj, ekoturismo, seminarioj) bonvolu viziti nian retejon: [verduloj.org/aveno36.htm](http://verduloj.org/aveno36.htm)

**Statistiko 2011-05-31:** AVE havas 325 membrojn, interesulojn kaj abonantojn de nia bulteno Aveno. 64 el tiuj estas membroj de ia Verda Partio, 35 estas asocioj kaj nuraj abonantoj, ĉ. 100 estas virinoj. Laŭ kontinentoj: Afriko 11, Ameriko 21, Aŭstralio/Ocenario 4, Azio 32, Eŭropo 257.  
Nia strukturo: Goerge Sossois, Michael Leibman kaj Manfred Westermayer kunlaboras en la provizora estraro; pluraj kunlaboras por aparta temo au regiono, kaj verkas artikolojn.  
**Membrigho:** Bonvole membrighi en AVE, speciale se vi estas membro de iu verda au kunlaboranta en la verda movado partio. **Kontribuo** pere de artikolo kaj/au pago de kotizo (vidu la kolofonon) inkluzivas

ricevon de jara koncizigita kolekto da artikoloj de nia semajna reta bulteno AVENO.

**Agado de AVE:** Malmultaj uzas nian diskut-reton <[lists.riseup.net/www/info/verduloj](mailto:lists.riseup.net/www/info/verduloj)>. Ni aktive subtenas i.a. projektojn de **Mramba Simba, Mazingira** en Tanzanio: orfo en lernejojn, rearbarigo, trink-akvo, kurento: [www.kono.be/mazinigra/](http://www.kono.be/mazinigra/)

Ni informas la Verdajn Partiojn pri Esperanto, kaj la Esperanto-Movadon pri la Verd(parti)a temaro. Ni tradukas kaj plusendas alvokojn subskribi kontraŭ maljustecoj, kaj detruo-minacoj de la ekologia viv-bazo. Ni redaktas kaj tradukas en Esperanton gravajn tekstojn de la Verda Movado:

**Ekologio de la Homo** - el teoria vidpunkto - de Juri Sokolov, tradukita de Tatjana Auderskaja nun trovighas sur [www.verduloj.org](http://www.verduloj.org)

Internacia retejo kiu traktas la kunligitajn temojn de **Dauripoveco, Tutmondigho, Kulturo kaj Arto**. [www.cultura21.net/eo/esperanto-eo/ekologia-identeco/about-the-esperanto-language](http://www.cultura21.net/eo/esperanto-eo/ekologia-identeco/about-the-esperanto-language)

**Filmetoj pri ekologiaj problemoj** en Esperanto - (organizitaj de la grupo Frejburgo): ekz-e pri plastajhoj en la akvaroj: [www.youtube.com-serchu](http://www.youtube.com-serchu) "Verduloj"

**"100 Bonaj argumentoj kontraŭ la atomenergio"** vidu: [www.verduloj.org/energio.htm](http://www.verduloj.org/energio.htm)  
Lautema kolekto de argumentoj kun la apartenantaj ret-ligoj (en diversaj lingvoj); ni tradukis la broŝuron de EWS-Schoenau.de, kooperativo provizi kurenton plejparte el regajneblaj fontoj kaj distribuita kuplita kurento-varmo-generado.

**AVE-Konsiloj:** Efika Uzado de Energio - aktualigita La unua grava afero estas havi bone izolitan domon (en la malvarmaj regionoj de la tero). Se temas pri malnova domo prefereble izoli ĝin de ekstere, tiel, ke ne estas t.n. "pontoj por la malvarmo", ĉar je mal-varma areo je la muro, tie kolektighas la akvo(vaporo). Sed, se oni havas vento-ne-tralasivajn fenestro-framojn, necesas alimaniere aerumi la ĉambrojn. Plej efike per automatataj aerumiloj, kiuj regajnas parton de la interna varmo. Temas pri ceramikajho, kiu

alprenas la varmon kiam la aero elfluas, kaj redonas la varmon kiam la malvarma aero enfluas. Kiam estas tre malvarma ekstere, oni ech vidas glaci-pendajhojn ekstere. La aparato bezonas iomete da elektra energio (2,5 W) dum uzado en la malvarmaj monatoj, sed regajnas multe pli da varmo-energio - kaj evitas la shimo-alkreskon, char interne estas seka aero. Kompreneble ankaŭ la fenestro-vitrajho gravas, kaj shparas energion - krome se ne estas malvarmaj areoj je la muro au fenestro oni sentas sin pli komforta, ech se la temperaturo estas malpli alta.

**Hejti, varma akvo:** Ni uzas la varman akvon de la sunkolektoroj sur la tegmento ankaŭ por niaj lavmashino (ghi havas enirojn kaj por varma kaj por malvarma akvo) kaj vazar-lavmashino.

**Aktualigo** okaze de la atom-energia katastrofo de Fukushima 2011-03-11:  
La dua grava afero estas redukti la bezonatan kurenton. Jen malmultaj ekzemploj:

**Fridujo** devas esti bone izolita, kaj stari prefere en malvarma loko; kaj tiuj por kampingo-vagonoj (skoltado ?) ja uzas kontinuan kurenton, kion vi povas stoki per PV & akumulatoro. Kaj eble oni povas redukti la dimension de la fridujo - sed alia afero estas, chu oni bezonas **frostujon**. **Kuir-forno**, se ghi uzas kurenton, estas plej efika kiam per indukto. Tiele oni nur varmigas la kuir-poton, ech pli rapide char ankaŭ la vando estas hejtitigata. Sed ne chiuj kuir-potoj taugas; ghi devas esti magnetizeblaj. do, aluminio kaj kupro ne funkcias. Frutempe malshalti kaj uzi la estantan varmegon helpas. Investi en pli novan aparaton au ech teknikon estas efika.

Intertempe **lumo** estas plej efika per LED-oj, sed tio estas ankoraŭ multekosta, kaj eble ne tiom agrabla kiel la plenspektra lumo de ard-bulbo. Sed por kelkaj areoj ja sufichas tia lumo. La alia tekniko de fluoreskaj bulboj, kiuj havas 4-oblan lumefikon kompare kun la ardantaj havas la malavantaghon ke ghi uzas hidr-argan vaporon en ties atmosfero - do, necesas plena sistemo por ne-poluanta reciklado. La vivodaŭro de la fluoreskaj estas pli alta ol tiu de la ardantaj, sed LED-oj ech multe pli longe vivas (lau mia informo).

**Atendo-kurento:** Kompreneble - la elektronikaj aparatoj (radioaparato, k.tp.) kiuj estas daŭre ligitaj al la kurento-linio devas havi shaltilon, kiu komplete malshaltas. Vi povas kontroli tion per mezurilo kiun vi metas por prov-tempo inter la aparato kaj la konektilo por mezuri la atendo-kurenton (angle: standby) kaj ankaŭ la povumon au energio-bezonon por certa tasko kaj je diversaj aparatoj en tuta domo au vilagho.

**2011: Internacia Jaro de la Arbaroj**  
2010-10-10 Tago de la Monda Klimato  
2011-04-27 Internacia Tago Averti la Bruon

**Atomkatastrofoj:** (jen nur la plej gravaj ne-militaj)  
1956 Majak (Uralo) Atom-eksplodo de rubajho.  
1979 „Three Miles Island“ Harrisburgo (Usono).  
1986-04-26 Chernobilo: [www.tschernobyl25.org/](http://www.tschernobyl25.org/)  
Ankoraŭ dum jarcentoj la tiam elpushitaj radioaktivaj isotopoj Cezio-137 kaj -134 kaj Stroncio-90 trovighas

en la chirkauajho, aparte en meza kaj orienta Europo. Oni ne scias precize kiom da homoj intertempe mortis tro frue pro tiu radioaktiva poluo (chefo de duona Europo); sed vivas homoj kun reduktita sano kaj infanoj kun gravaj san-difektoj. Multobligo de tiroida kancero estis nur unu el la plej certe atribueblaj sekvoj de chernobilo (pro Jodo-131). Kanceroj bezonas ch. jardekon por evoluighi.

**2011-03-16 Fukushima:** la fandigho de brul-stangoj okazis jam pro la tertremo; intertempe granda regiono en Japanio estas tiom radioaktive poluita, ke homoj tie ne plu povas vivi; oni uzis gigantan amason da marakvo por la malvarmigo de la ardighanta restajho kaj tial la maro estis amplekse poluita. Kelkaj ret-ligoj: [eo.wikipedia.org](http://eo.wikipedia.org) (serchu: nuklea centralo Fukushima) Taglibro de Hori Jasuo: (eo) [satesperanto.org](http://satesperanto.org)

NRO-o por atentema minado-ekspluatado, tutmonde: Kanado, Nighero, Tanzanio, Australio, Uzbekio (de, en) [www.uranium-network.org](http://www.uranium-network.org)

Se ne okazos grava akcidento tiam estus bona metodo "**bruligi**" la **Plutonion de atomarmiloj** en bredil-reaktoro kun likva natrio kiel malvarmiga medio, kiel okazos en Beloyarsk en la Uralo. Beloyarsk 3 nun laboras dum 30 jaroj - la plej malnova bredil-reaktoro; sed nun oni komencas uzi ghin ne por produkti Plutonion sed por bruligi ghin. (DLR, 2010-10-03)

**Atomreaktoroj distribuas radioaktivecon** tute normale ! Cezio-137 trovighas sur la grundo de la Rejno-kanalo kiu malvarmigas la atomcentralon de Fessenheim (Francio). Ekz-e de la radioaktiva isotopo de Hidrogeno Tricio (H-3) 23.340 miliardoj Becquerel (bekerel) estis ellasitaj, kio ech estas malpli ol la lim-valoro. En formo de (radioaktiva) akvo au metabolita molekulo ghi eniras la organismojn kaj en ili ghi estas danghera. (lau BZ, 2010-10-14, p. 8) - pli sur: [verduloj.org/100\\_arg/100\\_Argum\\_12\\_19\\_eo.htm](http://verduloj.org/100_arg/100_Argum_12_19_eo.htm)  
Kien alia radioaktiva rubajho ? vidu Aveno#36 - eko

**Aliaj temoj pri ekologio kaj ekonomio:**

2011-05-09, Chilio planas HydroAysen: 5 gigantajn **barlagojn en Patagonio** por kurento.

La NRO-oj protestas kaj rakontas ke la proceduro akcepti tiun projekton estis ne sufiche travidebla. Oni detruos grandajn areojn per la barlagoj, kaj la kurento-trako estos same giganta: 2.000 km kun largheco de minimume 100 m. (cn, en, es, pt) [www.internationalrivers.org/de](http://www.internationalrivers.org/de)

Je la ekspluatado de **Neodimo** (uzata por permanentaj magnetoj) ekz-e por ventoradoj) kunvenas radioaktiva elemento torio.

Rusio minacas kaj malliberigas naturdefendantojn: La arbaro de Chimki apartenas al la verda zono chirkau la urbogiganto Moskvo. La registaro planis auto-shoseon tra la **arbaro de Chimki** - proksime de Moskvo. Arbaroj estas leghe protektataj, sed Putin (la sistemo) faris escepton. (x+ru) [www.khimkibattle.org](http://www.khimkibattle.org)

La **porko-balenoj** en la Balta Maro estas minacataj. Ili estas kaptitaj ne-intencite de grandaj fishistaj retoj, en kiuj ili sufokighas. En la Balta Maro enfluas ankoraŭ

tro da nutraj substancoj, pro kio parto de la profundaj areoj estas senvivaj. Bruego minacas pro konstruado de ventradaj; reduktendas bruoj per aerobobela vualo. [www.wdcs.org/](http://www.wdcs.org/)

Ankaur „Zieloni 2004“ subtenas la peticion por la **praarbaro** en la nord-oriento de Pollando.

Ok jaroj post la enkonduko de Bollgard (GMO-Kotonsemoj de Monsanto) jam la dua evolu-shtupo de **Bollgard**, kiu devus mortigi la larvojn de koton-vermo, tio **ne plu funkcias**. Tio signifas ekonomian perdon por la koton-kulturistoj. [www.global2000.at/site/de/](http://www.global2000.at/site/de/)

**Agrikultura veneno Glyphosat**: grandskala kulturado de soj-faboj kaj plurfoja shprucado per aviadiloj de la total-herbicido Glyphosat kaŭzis malsanojn, astmon, kaj reduktitan kvaliton de spermatoj. Post limigo de la areo la malbonaj efikoj reduktighis.

**Lobiada korupcio** en EU: la eŭropa aŭtoritato pri nutrajho-sekureco (EFSA) estis gvidata de s-ino Diana Banaiti, kiu ankaur sidas en la Internacia Instituto por la Vivo-Sciencoj (ILSI) de la GMO-industrio. La ekspertizo de EFSA estas la bazo de la decidoj de la EU-Komisiono - do, fakte la industrio decidis super la politiko. José Bove, franca MEP (membro de la EP) de Europe Ecologie (Verduloj) pro tio postulis la abolicion de tiaj jam deciditaj permesoj.

La artikolo 11a de TEU (Traktato de EU), rajtigas leĝproponojn je **popola iniciato**, prezentindaj al la Eŭropa Komisiono kaj subskribitaj de almenaŭ unu milono da EU-civitanoj.

Kiel vi certe scias la mondo havas du gravajn problemojn (kiuj afektas ankaur aliajn sferojn): **"Peak Oil" = nafto-pinto**: la ekspluatado de nafto sinkas kaj aliflanke la bezono altighas !

**Klimato-Shanghigho**: pro la efiko de diversaj forcejdomaj gasoj (CO<sub>2</sub>, CH<sub>4</sub>, CFK), kiuj venas de la homaj & industriaj aktivecoj, la tutmonda averagha temperaturo altighas kaj pliakraighas la klimataj katastrofoj (inundoj, fajroj). Se oni traktas tiun du temojn aparte sekvas konsiloj kiuj kontraŭdiras unu-la-alian.

Lau Rob Hopkins "Transition Handbook" necesas altigi la rezistopovon de nia tutmonda socio.

1. Preferi regionan ekonomion - kun loka mono.
2. Redukti & pliefektivigi la energi-bezonojn.
3. Malcentrigi la energio-produktadon.
4. Re-klerigi pri teknikoj de memzorgo.

**Rezistopovaj urboj** diskutis pri rimedoj por fari urbojn pli daurigeblaj - transporto, energio - lau la Agendo 21 (Aalborg): [www.iclei.org](http://www.iclei.org)

**Pri Homaj kaj Bestaj Rajtoj**:

**AI** – nun 50-jaragha - defendas la rajton al senperforta agado kontraŭ registara arbitreco kaj despoteco. [www.amnesty.org](http://www.amnesty.org)

**APC** subtenas la Liberecon je Informado, kaj alvokas al registaroj ne malliberigi la fluon de informoj aparte kiam temas pri transparencio /travideblo de registara farado. Civitanoj devas kontroli siajn registarojn: [.apc.org/en/node/11620/](http://.apc.org/en/node/11620/)

**Informi pri lobiistoj / faifistoj**: [www.lobbycontrol.de](http://www.lobbycontrol.de)

Nuntempe en multaj shtatoj okazas **mistrakto de politike pensantaj civitanoj** se ili estas disidentoj kontraŭ sia malbona registaro au baloto-falsigoj. Jen surface nur kelkaj prijuĝoj, kiuj ĉefe rilatas al la sinteno de la registaroj kontraŭ la homoj. En preskaur ĉiu lando okazas lezoj de la Homaj Rajtoj.

**Belorusio**, la lasta diktaturo en Europo, lasis ludi balotadon; poste enkarcerigis manifestaciantojn kiuj protestis kontraŭ la falsaj kondiĉoj.

**Frontex baras EU**-Europon kontraŭ fughantoj.

La nomada popolo de la **Romaĵoj** ne ghuas la samajn rajtojn kiel la malnomadoj.

**Rusio**: jughkortumoj ne estas sendependaj (rilate la interesojn de la regantoj kaj oligarhhojn), ĵurnalistoj estas minacataj kaj mortigataj; la civila socio fakte ne havas rajtojn protesti.

En diversaj landoj prezidentoj & familianoj **koruptighas** kaj elsuchas la valorajhojn de la lando – Uzbekio... P.R.Chinio & **Irano** malliberigas disidentojn.

**Israelo** ne respektas la limon de 1967.

**Chinio** ne respektas la rajtojn de la t.n. autonomaj provincoj: Tibeto, Turkeŝtano, Interna Mongolio; sed ankaur inter han-ĉinoj estas granda malegaleco pro la mon-avido; la justico ne estas sendependa.

**Usono**: ankaur malliberigas homojn en Guantanamo sen atenti ties Homajn Rajtojn. La jugh-sistemo estas influata de rasismo kaj diferencigo lau sociala statuso.

Pafoj el tele-aviadiletoj mortigas ofte civilulojn. Usono ghis nun ne submetis sin al la UN-Jughkortumo. Mortpuno ankaur en pluraj provincoj.

**Teroristoj** - pro diversaj kaŭzoj - mortigas civilulojn; kelkfoje ili pretendas agi por religia celo.

**Jasmenaj Revoluciuloj** komencis - uzante la reton - anstataŭigi koruptajn registarojn. Bondezirojn !

**AVE kunlaboras kun la Verdaj Partioj**:

Jen la ĝenerala pagharo kie vi trovas la plej multajn Verdajn Partiojn kaj kontinentajn federaciojn.

[.globalgreens.org/parties](http://.globalgreens.org/parties)

En 2012 okazos la tutmonda Verdula Kongreso en Dakaro: [www.globalgreens.org/senegal2012](http://www.globalgreens.org/senegal2012)

--- **Verduloj en Afriko** ---

Jam en multaj Afrikaj landoj ekzistas Verdaj (au ekologiaj) Partioj, kiuj kunlaboras en la Federacio de la Afrikaj Verdaj Partioj (AGF): (en, fr)

[www.africangreens.org](http://www.africangreens.org)

Chu afrika AVE-ano emas partopreni:

2011-06-25/26, Ouagadougou, Burkinafaso,

**Akademio de la Afrikaj Verduloj**

2012-03, Dakaro (Senegalia), **Tutmonda Verda Kongreso**. [www.globalgreens.org/senegal2012](http://www.globalgreens.org/senegal2012)

AVE intencas prezenti la temon lingva justeco pere de Esperanto. Espereble ni trovos AVE-anojn - au lokajn samideanojn - kiuj povos partopreni. AVE kutime partoprenis la Tutmondajn Kongresojn de la Verdaj Partioj (en Canberra 2001 kaj Sao Paulo 2008)

- **Verduloj en Ameriko, Australio, Ozeanio kaj Azio**-  
2011-05-02 Gratulon al Elizabeth May, Kanado estis elektita en la House of Commons (Parlamento).

Gratulon al **Marina Silva**, kiu gajnis preskau 20% je prezidenta balotado en Brazilo.

Gratulojn al VP en **Australio** pro-gajnoj en balotoj.

**Japanio:** Gratuloj al la kandidatino de la Verduloj, Kazumi Inamura, kiu estis elektita urbestro de Amagasaki je 2010-11-21. Amagasaki havas 460 mil enloĝantojn. Ŝi estas la plej juna urbestro en Japanio kaj la unua apartenanta al la verda movado Midori no Mirai (chu partio?). Iliaj ĉefaj temoj estas partoprena demokratio, malferma informado kaj trovi vojojn al ekologie daurigebla socio.

(jp) .greens.gr.jp/ , (cn, en, fr, jp)

[http://de.wikipedia.org/wiki/Midori\\_no\\_Mirai](http://de.wikipedia.org/wiki/Midori_no_Mirai)

### --- Verduloj en Europo ---

Gratulon al la granda sukceso de la **polaj kaj slovakaj Verduloj!**

2011-04 Verduloj en **Norda Irlando** prezentis ampleksan manifeston por la venontaj elektoj al konsilioj kaj la provinca parlamento.  
.greenpartyni.org/

AVE tradukis la deklaron de la Europa Federacio de la **Junaj Verduloj**; ghi trovigas sur ilia retejo:  
[www.fyeg.org/main/index.php/about-fyeg#esperanto](http://www.fyeg.org/main/index.php/about-fyeg#esperanto)

Esperanto Komisiono je la Francaj Verduloj:  
[lesverts.fr/article.php?id\\_article=645](http://lesverts.fr/article.php?id_article=645)

Jen raporto pri nia inform-budo je la asembleo de la **germana** Verda Partio, 2010-11-21/23 en Frejburgo. AVE prezentis, dank' al Michael Leibmann, Manfred Westermayer k. Ursula Niesert, la 26-jaran kunlaboron inter Verduloj & Esperanto.

Anoncis sin je nia stando 4 aliaj esperantistoj, kaj pluraj - inter ili eksterlandanoj - kiuj simpatias. Sed aliflanke multaj diris ke ni ja havas la anglan kiel mond-lingvon, eĉ se ili ne sukcesis mem paroli la anglan. Por interesuloj ni ankau donis la proponitajn Sunmontajn Gvidliniojn pri a rolo de Esperanto en la Europa Unio kune kun la EU-himno en Esperanto (versio de U.Brocattelli).

Ni alparolis kelkajn el la verdaj politikistoj divers-nivelaj; ekz-e Reinhard Buetikofer (MEP), kaj Winfried Kretschmann (MdL), nun ĉefministro en Baden-Virtembergo demandis min preter la stando kiel status Esperanto - kaj felice mi povis diri ke junuloj renkontighas internacie kaj entuziasmighas kaj ke ankau la Verduloj Esperantistaj pliighas (po-gute).

2011-05-05 Germanaj Verduloj kaj Socidemokratoj findecidis la **verd-rughan koalicion** en Baden-Virtembergo. La unua grava problemo estas la komencitan subgrundigon de la ĉefstacidomo de Stuttgart: [engpass21.de/](http://engpass21.de/); en aliaj federaciaj landoj estas rugh-verdaj koalicioj.

2010-10-08/10, Tallinn, **Europa Verda Konsilio**. Por AVE partoprenis Mara Timermene. Ĉefaj temoj: Verda Nova Konsento ( Klimato, energio, ekonomio) kaj kunlaboro ene en la Europa Verda Partio

2011-05-14 **Verda Europa Fonduso** lanchis subpagaron "en aliaj lingvoj". Kutime GEF (Green European Foundation) raportas en la angla - sed pli kaj pli ili vidis, ke ne ĉiuj regas la anglan sufiche bone pro tio aperis tekstoj en aliaj lingvoj:  
[europeangreens.us2.list-manage1.com/track/click?u=823d8d6ab731c7b48a1ee517d&id=386abe3ca0&e=bb8b45cf99](http://europeangreens.us2.list-manage1.com/track/click?u=823d8d6ab731c7b48a1ee517d&id=386abe3ca0&e=bb8b45cf99)

**Kampanja Manlibro** de la Europa Verda Fonduso: Sufiche ampleksa - reta "man"libro - eble ni povus elekti kelkajn ĉapitrojn kaj traduki.  
(en) <http://campaignhandbook.gef.eu/>

### AVE kunlaboras kun:

SAT, UEA, TEVA kaj Europa Esperanto-Unio (EEU)  
[eeu@europo.eu](mailto:eeu@europo.eu) , [europo.eu/en/chefpagho](http://europo.eu/en/chefpagho)  
(en) [www.springboard2languages.org/home.htm](http://www.springboard2languages.org/home.htm)  
Informo pri Saltotabulo en aliaj lingvoj:  
[www.freeweb.hu/egalite/salto/saltode.htm](http://www.freeweb.hu/egalite/salto/saltode.htm)

**AGENDO 21:** Kiel vi eble scias, AVE jam ekde 1998 proponas amendon de la UEA-Statutoj per la temo "daurigeblo" - lau la Pinto-Kongreso pri la tutmonda naturmedio en Rio 1992 kaj Jo-burg 2002 Ni jam prezentis nian deziron al UEA por pritrakti ĝin en kadre de la venonta UK en Kopenhago. Intertempe ni vidas ke tiu temo ighas pli akra. Jen nur kelkaj gravaj terminoj por nia estonta mondo:  
(en) resilience = rezistopovo  
(en) sustainability = daurigeblo  
(en) subsidiarity = laueble loka memzorgo  
(en) serendipity = prudenta akcepto de hazardaj informoj

Ekster la tempo de baloto-kampanjoj ni kunlaboras kun **EDE**-anoj, ĉar temas nur pri grupo kiu subtenas nian partian agadon por Esperanto.

Sed AVE ne kunlaboras kun Unu Mondo Partio, ĉar tiu estas rekta konkurenco kun tre simila programo.

### Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE):

Ĝeneralaj informoj pri AVE trovigas en AVENO 34. Font-indikoj kaj pliaj raportoj trovigas sur nia retejo. Jara Kotizo (propono, inkluzivas Avenon papere ) A-Landanoj kaj "riĉuloj": 5+x EUR, B-Landanoj: 2 EUR Ni scias ke ne ĉiuj povas (trans-)pagi facile. Paginda letere per monbileteto (EUR, USD, SFR, ..) au rekte al nia UEA-Konto: „avex-z“ au per transpago al la nederlanda UEA-poshtkonto: IBAN: NL24PSTB0000378964, BIC: PSTBNL21 Ne forgesu la noticon: ("via nomo" por Konto avex-z)

AVE sekretario:  
Manfred Westermayer  
Kandelstr. 62  
DE-79194 Gundelfingen  
[ave@verduloj.org](mailto:ave@verduloj.org)  
[www.verduloj.org](http://www.verduloj.org)



AVE - la ligo inter Verduloj kaj Esperantistoj Ni pensas tutmonde & agas surloke kaj regione.

### La bazo de nia sukceso: via kunlaboro.

Ni preferas koncizan tekston (rtf-formato), cx-ux, ch-u; au NHA ( [pagesperso-orange.fr/kavlan/nha/nha.html](http://pagesperso-orange.fr/kavlan/nha/nha.html) )